

# La letero de l' Akademio de Esperanto

N° 8 — Julio - Aŭgusto - Septembro 1989

ISSN 0986-1181



Astronomo el miaj amikoj, specialisto pri Siriuso kaj ĝia planed-sistemo, raportis al mi pri onidiroj: la Siriusanoj observus nin kaj studus la psikologion de la Tera Homa specio! Ilia civilizacio estus tre avancita kompare al nia; ne mirige, ili jam de longe adoptis sian "Esperanton" kiel oficialan! Surtere oni komencas tre diskuti por determini, ĉu temas pri kaŭzo aŭ pri konsekvenco...

Ili do aŭskultus nin kaj ili aŭdus konfuzan voĉbruon: iliaj aparatoj jam sukcesus malmiksi kelkajn frazojn, kiuj povas aplikigi al iu akademio: "Kion ĝi faras?", "Ĝi faras nenion!". Sed de temp' al tempo ili aŭdus fortan kaj akran krion: "Tute malbonan decidon ĝi eldonis!".

La Siriusanoj kun granda intereso jam deduktus el tio, ne nur ke la Teranoj ne povas elporti, ke akademianoj longe studadas en la sereno kaj silento de siaj bibliotekoj; sed ankaŭ ke minoritatoj ne povas suferi akademiajn decidojn faritajn cele al ĝenerala bono, se tiuj kontraŭas ilian personan guston: kaj ĉar ŝajne sur Tero persona gusto estas tre diversa kaj pli ŝatata eĉ ol scienca opinio, ne povas ne esti specifa minoritato kontraŭ kiu ajn decido. Sekve kiu ajn decido estas salutita per forta kaj akra kriado: la tiama specifa minoritato manifestas sian personecon kaj opozicion.

Ŝajne la Siriusanoj treege progresis en la scio pri la Homaj malfortaĵoj. Ŝajne do ni devus zorgi por ricevi la unuajn biletojn por la proksima vojaĝo al Siriuso: iuj el niaj ĵurnalistoj kaj redaktoroj povus profiti el staĝo pri Tera psikologio en tiu fora mondo.

D-ro André ALBAULT

# LA ROLOJ DE LA AKADEMIO

(daŭrigo de la artikolo aperinta en n° 6 de la L.A.E.)

## II- ROLJ DE LA AKADEMIO LAŬ LA HODIAŬA STATUTO

La hodiaŭa statuto de la Akademio aludas ties rolon en du el siaj artikoloj. La unua artikolo tekstas:

*"La Akademio estas sendependa lingva institucio, kies tasko estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon."*

La artikolo 23 komenciĝas per jena frazo:

*"La Akademio solvas la al ĝi submetitajn lingvajn demandojn laŭ la principoj de la "Fundamento de Esperanto".*

Estas notinde, ke nenie tiuj principoj aperas konkrete kaj eksplicite.

Apartenas al ĉiu intereso studi kaj starigi ilin; li ne nepre devas esti lingvisto aŭ Akademiano: sed nur al Akademianoj apartenos aprobi aŭ malaprobi, sankcii per oficialigo aŭ ne la tiel starigitajn principojn.

### DU MALSAMAJ AFEROJ

Aliparte, kvankam ni parolas pri ili per preskaŭ la samaj terminoj, temas esence pri du tute malsamaj aferoj.

En la artikolo 1. temas pri "la fundamentaj principoj de la lingvo Esperanto." Do pri la principoj propraj al si, kiujn Esperanto posedas, kiel ĉiu alia lingvo: tiuj principoj devenas de la iniciatoro mem, ili formas la kernon de la tradicio. Eblas konkrete trovi la plej multajn el ili en unu libra dokumento, kiu ĝuste nomiĝas "Fundamento de Esperanto". Cetere, ja pri "la principoj de la Fundamento de Esperanto" temas en la artikolo 23.

### LA FUNDAMENTO

Mi ne etendiĝos pri la Fundamento: tion ni jam faris en serio de naŭ prelegoj, kiuj estos broŝurforme eldonitaj de la Sarlanda Ligo. Mi resendas al tiu broŝuro por detaloj: ĉi tie mi raportos nur pri tiuj malmultaj informoj, kiuj estas bezonataj por prilumi nian temon.

Necesas scii, ke la verkon "Fundamento de Esperanto" Zamenhof intence kreis kaj tuj poste klopodis sankciigi en la Unua Universala Kongreso (Bulonjo - ĉe maro, 1905) por surogati la mankantan tradicion, kiu ja subtenas la kontinuecon en kiu ajn lingvo. Por tion atingi li proponis tekston de "Deklaracio pri la esenco de la Esperantismo". Tiu deklaro - pli konata sub la nomo de "Bulonja deklaro" - entenas apartan alineon pri la Fundamento, kiu difinas tiun "verketon" kiel "*la sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj*". En ĝi neniu havas la rajton fari ŝanĝon". Sed ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la "Fundamento de Esperanto", ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tiu maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo".

Tiun deklaron - kaj do tiun verkon, kiel oficialan Fundamenton - sankcie aprobis en Bulonjo la Esperantistoj.

### NE KONTRAŬ LA UNUECA ESPERANTISTARO

Kompreneble, kion aprobas unu kongreso, alia povas forigi: tion konfirmis Zamenhof al la lin demandinta Prezidanto de la Akademio, Rektoro Boirac.

La demando volis forigi duban punkton de la deklaro: "*Ĉu ĝi valoras nur kontraŭ ĉiu privata individuo aŭ aparta societo proponanta pli malpli arbitr-ajn ŝanĝojn, aŭ eĉ kontraŭ la tuta esperantistaro kaj ĝiaj rajtaj reprezentantoj.*" La respondo de Zamenhof estis konciza kaj klara: "*La Bulonja Deklaracio ligas ne la tutan esperantistaron, sed nur la apartajn personojn.*"

Kaj li precizigis sian penson: "La Fundamento ekzistas nur por apartaj personoj, sed ĝi tute ne ekzistas por la tuta esperantistaro. Tiel same, kiel unu kongreso fiksis la Fundamenton, tiel same alia kongreso havas ja plenan rajton nuligi la Fundamenton se tio ĉi montriĝos necesa."

#### NULIGO DE LA FUNDAMENTO NENIAM ESTOS BEZONATA

Sed Zamenhof - same kiel la plimulto de tiuepokaj pioniroj kaj ankaŭ de la hodiaŭaj pripensantoj -- opinias, ke neniam bezonata estos la plena nuligo de la Fundamento. Restas la "skola hipotezo" de nur parta nuligo de la Fundamento; tio estus la kazo, se oni volus modifi gravan elementon priskribitan en la Fundamento; ekzemple, se oni volus modifi la alfabeton. Oni tiam devus unue nuligi la Fundamentecon de la parto "A. Alfabeto" komence de la "Fundamenta Gramatiko". La cetero de la Fundamento ne perdus sian aŭtoritatecon pro tio; eĉ male. Tiun ekzemplon mi prenis, kiel oportunan: ĝi estas tre limigita en sia formulado unuflanke, kaj aliflanke - ja okazis por sufiĉe multaj lingvoj, ke la ortografio estis modifita por la komforto de la uzantoj - ĝi verŝajne estas la sola kazo, mi opinias, ke neniam ni bezonos nuligi la Fundamenton: praktike, la tradicio enprenis en sin la tutan sukcon de la Fundamento; Zamenhof per tiu "verketo", kiel li nomis ĝin, sukcesis krei tradicion.

#### KONSERVI LA UNUECON

Pripensante la nunan staton de nia lingvo, la influon de la Fundamento kaj la pezon de la tradicio vid-al-vide de la funkcio de la Akademio, mi estis konvinkita opinii, ke finfine ĝia esenca rolo estas konservi la unuecon de la lingvo. La respekto al la Fundamento, al la pli fruaj decidoj de niaj lingvaj institucioj kaj nun pli kaj pli al la tradicio estas nur la armoj, pri kiuj ĝi disponas por defendi tiun unuecon. Des pli interesaj armoj, ke ilin povas uzi ankaŭ ĉiu kompetenta kaj klera esperantisto. Sekve povas helpi la Akademion kiu ajn klera persono; sed okaze de konflikto inter du interpretoj de la Fundamento, de la pli fruaj decidoj aŭ de la tradicio ja la Akademio devas tranĉi.

#### AFERO DE LA PARTICIPOJ

La Akademio estis yokita tranĉi en la lastaj jaroj, ekzemple, en la afero de la participoj. Ĝi estis tia afero en kiu du interpretoj ekskludis unu la alian. Ĉiu partio donis bonajn argumentojn por montri, ke la pravo estas ĝiaflanka, dum ĉiuj pekaj de Israelo sidas sur la dorso de la malamiko. Resume, estis du vojoj A kaj B, sed la lingvo povis laŭiri nur unu. En simila kazo armeo laŭiras la vojon prideciditan de la generalo. La rolon de generalo en tiaj esceptaj kazoj ludas la Akademio. En tiaj esceptaj kazoj ĉiuj celkonsciaj Esperantistoj ankoraŭ pli atentis la decidojn de la Akademio.

#### AFERO DE LA LANDNOMOJ

Aparta kazo, pri kiu mi devas rakonti al vi, estas la afero de la landnomoj. Mi jam estis studinta tiun problemon diakronie kaj sinkronie, kaj mi studis ĝin ne nur laŭ ĝia lingva aspekto, sed ankaŭ laŭ ĝia historia aspekto; Nome mi interesiĝis al la movado de la ideoj pri tiu nomenklatura flanko de nia lingvo, de 1887 ĝis hodiaŭ. Mi verkis pri tio libron, kiu estis aperunta ĉe T.K.-Stafeto, sed la malforteco de nia eldon-industrio - kiu meritis pripenson kaj helpon - faris, ke la efektiva eldono suferas prokraston. Kiel ajn estas, la tiama Prezidanto de la Akademio, William Auld, mendis de mi raporton pri la demando: ĝi estis distribuita al ĉiuj kolegoj. Pasis kelkaj monatoj kaj la statutaj elektoj, fine de kiuj mi troviĝis mem sur la prezidanta posteno.

## LA KVAR REKOMENDOJ

Ĉar neniu kompetentis nek emis prizorgi la problemon, mi proponis, ke do mi mem prizorgos: mi ja studis la demandon ĉiuflanke dum ĉ.15 jaroj! Tiel estis! Mi do kondukis la studon de la landnomoj kaj de ties formiĝo dum la tri jaroj de mia unua mandato. Tiun mi fermis per la voĉdonigo de rezolucio nomita "*Kvar rekomendoj pri la landnomoj*". Principe kaj teorie, ĝi sufiĉis por ke ĉiu samideano el du nomoj por unu lando elektu la ĝustan. Praktike, ĉar ĝi supozis aliajn konojn ol la kvar linioj de la rezolucio, ĝi eĉ ne sufiĉis por la debatoj en nia institucio. Sed ĝi tamen estis utila: venis la novaj statutaj elektoj, kaj do novaj kolegoj, kiuj ne kunstudis la aferon dum la pasintaj tri jaroj. Necesus ĉion refari. Sed la "Kvar rekomendoj" estis oponeblaj al ĉiu.

## LISTO DE NORMAJ LANDNOMOJ

Tiam la Akademio devis aliri la praktikan flankon: tiu povis esti nur la starigo de konkreta listo de landnomoj. Sed kompreneble ni albatigis al la sama fakto, kiu estis la kialo mem de nia entrepreno: la landnomoj ne estis unuecaj en la uzado de niaj samideanoj. Unuj aplikis iun dogman proceduron dum aliaj vigle defendis alian dogmon. La "haoso" de la landnomoj - kiel iu baptis iom ekscese la fenomenon - eĉ graviĝis de jar' al jaro. Apud Koreo ekaperis Koreujo, tuj defendata de tiuj, kiuj erare opiniis, ke la nova formo rekte devenas de la Korea lingvo, dum aliaj ne vidis motivon forigi la kutiman formon. Aliflanke, la Akademio laŭstatute ne rajtas iniciati novaĵon, eĉ se tiu "novaĵo" fakte jam estis uzata. Tiam mi enkondukis la nocion de "norma formo", de formo elektita laŭ iuj principoj - ĉi tie ĉefe laŭ la "4 rekomendoj" - el inter grupo de nun aŭ iam uzataj formoj, kelkaj el ili eventuale de nur minoritato. Laŭ tiu farmaniero nun estas preskaŭ starigita listo de nomoj, kiuj sufiĉos por traduki la liston de Ŝtato-Membroj starigitan de UNo.

## LA LANDNOMOJ : KOREO KAJ EGIPTO

Momente, restas principe lasta voĉdono, post kiu la listo povos esti eldonita. Sed mi jam povas diri, ke la du landnomoj Koreo kaj Egipto apartenas al tiu listo kaj krome, ke por ĉiu el ili ambaŭ la Akademio jam pozitive po rezolucion, kiu klarigas la motivojn de la Akademio por tia elekto. Aliparte, estas evidente, ke tiu nocio de normaj formoj eventuale povos utili en aliaj kazoj.

## NIA PUBLIKA OPINIO

Sed necesos vidi, kia estos la reago de la publiko. Tiuj normaj formoj devos esti akceptitaj de la plimulto por enradikiĝi. Mi povas nur diri, ke finfine la plej granda nombro el ili jam de longe estas en uzado; kaj ankaŭ ke supoze, ke la Akademio estus dezirinta adopti unu el la ekzistantaj dogmoj - sed kiun, do? - la modifoj, kiujn ni devus enkonduki en la lingvon estus konsiderindaj kaj krome ili farus nian nomenklaturon malpli internacia ol ĝi jam estis. Male, la adoptita sinteno faris ĝin multe pli internacia. Plie, ĝi apenaŭ modifas entute niajn kutimojn; ĝi nur reguligas ilin, alportante ĝustigon jen en detalo, jen en alia.

## GENERALA KONKLUDO

Jen kion oni povas diri pri la roloj de la Akademio. Mi resumis la situacion, parolante pri la roloj tiaj, kiaj ilin vidis niajn antaŭuloj en la tempo de Boirac; pri la roloj, kiaj priskribas ilin nia statuto kaj fine mi aldonis du vortojn por diri kiel mi mem vidas ilin: mi resumis, aludante pri la neceso konservi la unuecon de nia lingvo kaj fine konkludis per kelkaj vortoj pri mia sperto koncerne al la provo de "normaj formoj".

D-ro A. ALBAULT

## **PRI TERMINOJ**

La laborrilatoj inter la Akademio de Esperanto kaj la Terminologia Esperanto-Centro estas pli kompleksaj ol tion ŝajnis la tri mallongaj frazoj de J.T. en "Demandoj kaj Respondoj", paĝo 8 de "La Letero de la Akademio de Esperanto" januaro ĝis marto 1989. Tie tekstas: "Nur la Akademio estas normiga institucio". Sed tio priskribas la funkcion de Akademio en abstrakta organigramo. Apud la imagoj pri puraj sistemoj ekzistas la realeco.

Sola normiga Akademio devus konsisti el sufiĉaj kvantoj da fakuloj pri ĉiuj scioj. Tiuj kleruloj ne povus efike labori sen kompleta aparato el asistantoj kaj laboristoj sub sia gvidado. Por ĉiuj necesas domo kaj ekipado. Ni 45 Akademianoj simple ne kapablas plenumi la rolon de tia institucio. Mia fako estas ekonomio/ekonomiko; kun tiuj interesoj mi estas izolulo en la Akademio de esperanto.

En la realeco de la Esperanto-movado kunlaboras fakuloj, ankaŭ pri terminoj. Ĉar vivas miloj da esperantistaj sciencistoj sed estas nur 45 Akademianoj, la normkazo estas faka kaj terminologia laboro sen Akademianoj aŭ kun nur iu/iuj el tiu ĉi ĉefa lingva institucio inter ili.

Kiam mi verkas fake, nun pri konjunkturpolitiko kaj pri Eksterlanda Komerco, mi daŭre konsultas kaj ĉiam sekvas la Internacian komercan-ekonomikan Vortaron en naŭ lingvoj (en kies preparo mi mem kunlaboris antaŭ 17 jaroj). Tia libro estas normiga malgraŭ ĝia manko de Akademia aŭtentigo, simple ĉar ĝi ekzistas kaj estas bona laŭ la prijuĝo de la fakuloj. Nun la prilaborantoj de fakvortoj el ekonomio kolektiĝis en la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF). Prilaborantoj de terminoj rigardas la Terminologian Esperanto-Centron kiel taŭgan kunordiganton de la klopodoj pri fakvortoj.

Pluraj grupiĝoj de faksciaj esperantistoj mem ellaboris terminlistojn de siaj fakoj. Ampleksan laboron faris la fervojistoj. La ornitologoj same laboris. Mi ne komprenas sufiĉe pri fremdaj por mi fakoj kaj tial mi ne listigas ĉiujn meritplenajn laborojn sur tiu ĉi kampo de terminologio. Mi ja volis nur pruvi, ke okazis kaj okazas ekster la Akademio terminologia laboro kiu estas plene rekonita de la samfakuloj kaj kiu tial estis vere normiga.

La aserto en "La Letero de la Akademio de Esperanto", ke "la Terminologia Esperanto-Centro nur prepare helpas al la formulado de fakaj terminoj", ne montras ĝuste la gradon de memstareco en la laboroj pri fakvortoj ekster la Akademio en rondoj de fakuloj. Kio okazas tie, ne estas "prepara helpo". Kio estiĝas tie, estas (se bone farita) jam la laborfino kun normiga efiko. Mi atentigas nun denove pri la Internacia komerce-ekonomika Vortaro en naŭ lingvoj.

La Akademio de Esperanto estas esenca organo en la strukturo de la socio aplikanta la planlingvon Esperanto. Tio estas mia konvinko, kaj mi jam ofte deklaris tion kaj donis kaŭzojn en prelegoj kaj diskutoj. Se mi ne havus tute firme tiun ĉi starpunkton, mi ja ne dediĉus parton de mia laborpovo al la Akademio. Certe la Akademio estas la plej alta normiga instanco en la lingvo Esperanto. Tio validas ankaŭ por terminoj.

La Akademio devas kontribui al la terminologia laboro en la kadro de siaj fizikaj ebloj, kaj estus ege oportune se la Akademianoj kunlaborus ĉiu en sia fako por krei interligojn. Sed la Akademio ne lokigu sin sur postenon, kiun ĝi pro praktikaj kialoj ne povas teni. Tion farinte ĝi malhelpus la evoluon de la faka vortprovizo. La vastan kampon de terminologio prilaboru en saĝa labordivido kaj la Akademio kaj la fakrondoj, ĉepinte la Terminologia Esperanto-Centro.

.../...

Praktike tiu kunlaboro povus konsisti el kontribuoj de la Akademio pri metodoj de vortelekto kaj fundamenteco, dum la pure fakaj esprimoj restas la laboro de la fakuloj. La Akademio jam instalas sian organizan reton por fari sian parton de la tuta laboro.

Dr Werner BORMANN  
Vicprezidanto de la  
Akademio de Esperanto

#### PRECIZIGO

Mi konsentas, ke la respondo al inĝ. Pospisil estas iom tro konciza: ja la laboro pri traserĉado de terminoj bezonas kaj fakulojn kaj tempon (ankaŭ mi memoras mian kunlaboron en la Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro!). Neniel venis al mi en la kapo la ideo, ke la Akademio devas elekti mem la fak-esprimojn; sed apartenas al la Akademio arbitracia rolo ĝuste por la okazo de malakordo, kiel ekzemple pri "Komputilo, komputoro, komputero, komputatoro."

J.T.

\*\*\*\*\*

## **LA REDAKTORO VIN VOKAS !**

*Baldaŭ la tria jaro!*

Jam aperas jam de du jaroj "La Letero de l'Akademio", kiu ebligas kvarfoje en jaro estigi informilon inter la Akademianoj kaj la Esperantistaro: dank'al ĝi espereble neniam plu estos legebla en gazeto tia stranga aserto \*, ke "La Akademio laboras enkaŝejoj"!

Ĉe la venonta numero ekos nova jarabono: la tria. Ja la abonprezo povis ŝajni al pluraj iom alta; sed neniu forgesu, ke ekde nul lanĉi tian leteron sen ia kapitalo estas tre multekosta afero precipe pro la poŝtaj elspezoj kaj konsidere la neceson dissendi plurajn ekzemplerojn kun la nura celo diskonigi la leteron. Tial kun antaŭaj dankoj la redakcio fidas al vi ĉiuj, karaj gelegantoj, geamikoj de la Akademio, por la renovigado de via abono.

J.T.

\*- El letero de Sro R.Ŝulco, aperinta en "La Gazeto" (n°23-15/6/89)

\*\*\*\*\*



## KRONIKO de la NUNTEMPO

### Post unu jarcento kio nova pri la Akademio ?

Daŭre R. Sulco kritikadas la Akademion\*, ĉar tiu ĉi ne konsentas apogi lian "logikegan" konjugacian temposistemon, kiun refutas centjara uzado kaj beletro...

La redaktoro de "ESPERANTO" rifuzas aperigi la fresân "Oficialan Informon de la Akademio", ĉar kelke da legantoj ne konsentas pri kvar vortoj el la tuta listo da landnomoj aprobitaj de la Akademio...

Kiom da bruo pri nur kvar vortoj! Oni ja rajtas demandi sin, por kio D-ro L.L. Zamenhof deziris fondi la Akademion, se ne ĝuste por eviti lokajn iluziojn aŭ fantaziojn.

Kaj jen Claude Piron ĵus verkis libreton, kiu sub la titolo "La bona lingvo" iel proponas reformi la tutan vorttrezoron de la lingvo, por ke ĝi evoluu laŭ direkto ne "fremda al ties fundamenta naturo". Nur li laŭ sia tezo per sistema kunmetado de vorteroj parolas "la bonan lingvon"; kio signifas, ke por "telefono" - kvankam havaja lingvo uzas vorton "kelepona" kaj eĉ la ĉina lingvo la esprimon "te lu feng" Esperanto devus utiligi la vorterojn "foren-parol-ilo"-n!

Ja la Akademio jam de longe devis fronti aliajn konfliktojn, kiel estis ekzemple la Ido-krizo; plej taŭgus al ĝi la Pariza devizo: "Fluctuat nec mergitur", ĝi skue flosas sed ne mergiĝas!

J.T.

\* LA GAZETO, n° 23-junio 89

° PLANLINGVISTIKO, n° 9-1984- Istvan Szerdahely

\*\*\*\*\*

("Demandoj kaj respondoj-daŭrigo-")

Prononci: ekri, elitiĝi, elabori...?

Suomo estas tute kulpa vorto: devus esti minimume Suom/Suomanoj laŭ la Finna lingvo (Suomi - Suomalainen).

Vato estas el la sama faruno: ĉiutage uzate de kuracistoj, ĝi estas koton-simila materialo laŭ la Fundamento; sed pro siaj elektraĵoj aparatoj la kuracistoj uzadas ankaŭ vattojn. Estas vero, ke oni povus diri ankaŭ wato aŭ watto se oni atentus la proponojn faritajn de Verax antaŭ 1914!

Verfakte duoblaj konsonantoj estas allaseblaj, ĉar prononceblaj, nur sub unu kondiĉo: silabo-limo disigu la du konsonantojn. Tiel same por la h apud (antaŭ aŭ post) konsonanto: Buddha fariĝas aŭ Bud-do aŭ Bud-ho, kiel la Fundamenta mir-ho. La duoblaj konsonantoj utilas por propraj nomoj kaj malmultaj kulturvortoj.

A.A.

\*\*\*\*\*

## DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

D.- Ĉu la Akademio akceptas la ĉjaman uzon de "danke al" anstataŭ "dank'al"? Ĉu "dank'al" estas deviga? Ĉu bonstila? Ĉu iu perdis sian econ esti unu el la bonaj aŭtoroj, ĉar li nur daŭre uzas "danke al"? (C.G.Güskel)

R. "Dank'al" estas Zamenhofa kaj tradicia: tute oportuna, kial ŝanĝi ĝin pro tute teoriaj konsideroj, kiuj nenion praktikan alportas? La elizio laŭ la Fundamento anstataŭas "-o"; do la unua ideo estis "danko al": danko al lia konsilo mi sukcesis mian taskon. A.A.

D- Kion la Akademio opinias pri vortoj kun "ge - kiel en "gelernejo", "ge- edukado", "geduŝejo", "gevestaĵvendejo" ? (C.G.Güskel).

R.- Lernejo ne havas sekson. Punkto fino. Sed ĉiu rajtas amuze vortigi siajn fantasmojn. A.A.

D.- Laŭ PIV la vorto "ali/es" "estus maksimume allasebla". Mi opinias tiajn kunmetaĵojn ( same kiel "mies, vies, ŝies, multom, kelkam) plene malĝustaj, kontraŭ- Fundamentaj kaj eĉ danĝeraj, se ne temas pri konscie ŝerca stilo: A - Kies ĉemizo estas tio? B - Mies!!!- Kion la Akademio opinias pri "aliies", "aliii", "kelkiam"?

Unuflanke "ĉio", "tio", "nenio" estas memstaraj vortoj laŭ la Fundamento; duaflanke ili estas substantivoj kun fina -o (tiel en PIV!). Kion la Akademio opinias pri la ĉi-tiea apliko de la 16-a Regulo, do "ĉi", "ti", "neni"? Se la Akademio kontraŭas, ĉu ĝi ankaŭ neas por la poezio? Bonvolu permesi al mi citi mian libron POEMETE POETEME (p.59):

Per ili rideti kapablas nur ŝi  
Kaj al mi deziron direkti,  
Kaj miajn angorojn korekti:  
En tiuj du steloj troviĝas ja ĉi. (C.G.Güskel).

R.- Poeziaj licencoj ekzistas en ĉiuj lingvoj. Iuj legantoj ŝategas, aliaj mallaŭdegas... A.A.

D.- Kiun prepozicion konsilas la Akademio por urbo ambaŭflanke de rivero. Ĉu "Frankfurto ĉe Majno", "Esvajlero apud Indeo" (Eschweiler an der Inde), "Parizo laŭ Sejno", "Ulmo je Danubo", "Eranjo sur Uazo" (Eragny-sur-Oise)? (C.G.Güskel).

R.- Jam de "Bulonjo ĉe maro" la uzata prepozicio estas "ĉe". A.A.

D.- Kion la Akademio opinias pri radikoj kun duoblaj konsonantoj, t.n. "nomomismoj"? (C.G.C.)

R.- Se la duoblaj konsonantoj ne ekzistus en Esperanto, kiel do - obeante la Fundamentan Regulon 9 - prononci la vortojn: ekkrei, ellitiĝi, ellabori, kaj multajn dekojn da aliaj, kiuj devige enhavas duoblajn konsonantojn? Ĉu ... daŭrigo p.7)

---

" La Letero de l' Akademio de Esperanto", trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de esperanto", 5, rue Léon Cogniet F- 75017 PARIS- Francio  
Direktoro de la publikaĵo: André BOURDEAUX Redaktoro: Jean THIERRY Presejo: Coconnier, Sablé s/ Sarthe- C.P.P.P. n-ro 69710 1 n-ro: 40FRF Jara abono: 120FRF. Pagebla ĉe kontoj:

Banko: Crédit Lyonnais n-ro 7090F Poŝtĉekkonto: 735 27 B Paris

U.E.A.: Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag): precizigi "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto".

Peranto por tuta Nordo: S-ro Jan SOSNIECKI, Dalslandsgade 8, M201 DK-300 Kopenhago S. Danio- Poŝta ĝiro : 8 55 56 72

Peranto por tuta Azio: S-ro UEDA Yosimi, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, TOKYO 153- Japanio

Peranto por Meksiko: S-ro Enrique LEMUS RODRIGUEZ, Insurgentes Sur. 3493; villa Ilimpica edif. 27-001 14020 Tlalpan, México DF Meksiko.